# Gazetara komunikadplano

## 1 Objekto

Ĉi tiu dokumento estas projekto por la komunikado de UFE al la gazetaro.

## 2 Perimetro

Ĉi tiu plano ne rilatas al la komunikado interna (al la membroj kaj al la ligitaj asocioj) nek ekstera pere de aliaj informiloj, kiel ekzemple flugfolioj, retejoj, reklamvaroj, ktp.

## 3 Celoj

Ĉi tiu plano celas:

- ✔ konigi esperanton al la plej multaj homoj en Francio pere de amaskomunikiloj,
- ✔ kunordigi la agadon de diversaj homoj en UFE kaj aliaj francaj esperantistoj,
- ✔ prepari la laboron antaŭ la celtrafeblaj momentoj,
- ✔ plifaciligi la taskotransdonon inter la sinsekvaj vic-prezidantoj pri eksteraj rilatoj (VPER) de UFE.

## 4 Kunteksto

La gazetarkomunikaĵoj (GazKom) devas respekti la statutojn de UFE kaj ĉefe sian neutralecon escepte pri la lingva diverseco.

## 5 Agantoj

Ĉi tiu plano celas kunordigi la agadon inter la diversaj agantoj kiuj strebas al publika konsciigo pri esperanto.

### *5.1 Proponantoj*

Ĉiuj francaj esperantistoj (membroj aŭ ne de la landa asocio) rajtas proponi tekston pri iu ajn temo kiu rilatas pli malpli al Esperanto aŭ kiu povas logi atenton pri esperanto.

### *5.2 Klubestroj*

Ĉiuj klubestr(aran)oj kaj asociestr(aran)oj rajtas proponi informojn pri la aktivaĵoj de sia propra klubo aŭ asocio, cele diskonigi tiujn informojn al la loka gazetaro.

### *5.3 Korespondantoj (RK + FK)*

La regionaj federacioj kaj fakaj asocioj rajtas nomi regionan respektive fakasocian korespondanton kiu rilatos kun la VPER, kunordigante la proponojn el sia regiono aŭ el sia fakasocio.

Se ne estas aktiva federacio nek nomita RK, unuopaj kluboj kaj aktivuloj rajtas rekte rilati kun la VPER.

### *5.4 Reviziantoj*

Bonvolaj reviziantoj estu disponeblaj por relegi la GazKom-projektojn, en sufiĉe mallonga tempo, antaŭ ilia forsendo al la gazetaro.

Anaro proponebla:

- ➔ Axel Rousseau

- ➔ Aleks Kadar
- ➔ Bruno Flochon
- ➔ Claude Nourmont
- ➔ Cyrille Hurstel
- ➔ Philippe Debrix
- ➔ Xavier Dewidehem
- ➔ ktp ?

### *5.5 Vic-prezidanto pri eksteraj rilatoj*

La VPER zorgas pri la rilatoj kun Datapresse kaj responsas pri ĉi tiu gazetara komunikadplano.

Tio ne devigas ŝin/lin mem redakti ĉiujn GazKom.

### *5.6 UFE-estraro*

La estraro aprobas ĉi tiun gazetaran komunikadplanon.

### *5.7 UFE-komitato*

La komitato elektas la VPER tuj post la jarkunsido.

### *5.8 UFE-membraro*

La membraro ricevas bilancon antaŭ la jarkunsido.

## 6 Organizado

Proponantoj kaj klubestroj (memstare aŭ pere de kunordigantoj) sendas projekton al la VPER. La projekton karakterizas:

- ➔ teksto (minimume xxx vortoj, maksimume yyy vortoj),
- ➔ bildoj (sufiĉe bonkvalitaj),
- ➔ informfontoj (ekzemple retejaj adresoj),
- ➔ celitaj gazetoj kaj regionoj,
- ➔ kalendara plano,
- ➔ diversaj rimarkoj.

Inventindas formularo por rikolti ĉiujn tiujn informojn.

La VPER:

- ➔ ĝisdatigas la gazetaran komunikadplanon kaj rete informas la estraron pri la enhavo,
- ➔ enpaĝigas la validitan teksteton kadre de la ŝablono,
- ➔ sendas ĝin al la konstantaj reviziantoj, la eventuala korespondanto kaj la proponinto,
- ➔ atendas (se eblas) reagojn kaj konstruivajn kritikojn dum 48 horoj,
- ➔ laŭbezone korektas la tekston,
- ➔ sendas ĝin al la gazetaro pere de la retejo Datapresse,

- ➔ respondas aŭ peras demandojn far la ĵurnalistoj.
- ➔ ĝisdatigas la bilancan parton de la gazetara komunikadplano,

En kazo de neinterkonsento pri la komunikaĵo, la VPER povas peti validon de la temo kaj de la enhavo respektive al la komitato- kaj al la estraro-diskutlistoj.

# 7 Kalendaro

Ambicie devus aperi GazKom pri ĉiu grava novaĵo de la esperanta movado kaj okaze de aktualaĵoj reagindaj laŭ poresperanta agado.

Almenaŭ aperu regula GazKom, por ke gazetaro ne forgesu pri la temo, do inventendas kialo por GazKom ĉiumonata.

# 8 Listo de priinformindaj eventoj

## *8.1 Regulaj eventoj*

- ➔ Kongresoj: UKoj, interasociaj, landaj, federaciaj, ktp
- ➔ Renkontiĝoj: FESTO, Esperanto-Kafo, ktp.
- ➔ Staĝoj: Grésillon, Bouresse, klubaj, federaciaj, SAT-Amikaraj, ktp.
- ➔ KER-ekzamenoj.

## *8.2 Unuopaj eventoj*

- ➔ Kongresoj: UK 2015, 5a afrika kongreso
- ➔ Publikaj eventoj: ekspozicioj, prelegturneoj, prelegoj, koncertoj, ktp,

## *8.3 Unuopaj informoj*

- ➔ Eldonoj: libroj, bilstrioj, poŝtmarkoj, ktp,
- ➔ Diservoj dumkongresaj (cele al prireligiaj gazetoj),
- ➔ Petskriboj

## *8.4 Gazetaraj temoj komentindaj*

- ➔ lingvo-politiko,
- ➔ regionaj lingvoj,
- ➔ angla lingvo,
- ➔ lingvo-instruado,
- ➔ ktp.

## *8.5 Reagoj al gazetaraj artikoloj pri Esperanto*

## 9 Gazetarkomunikaĵoj

La GazKom konsistas el 1 ĝis 2 paĝaj dokumentoj, PDF-formataj laŭ modeloj de Bruno Flochon kaj Xavier Dewidehem (cf. aneksoj).

La ĉefan enhavon oni tekstformate konservas por la retmesaĝa sendo far la servo Datapresse.

Oni sendas gazetkomunikaĵojn al selekteblaj ĵurnalistoj per la retejoj :

http://www.datapresseliberte.net

http://mobile.datapressepremium.com

La ensaluton oni faras per la uzantnomo **DLOISON** kaj pasvorto ********.

## 10 Listo de planitaj gazetarkomunikaĵoj

## 11 Listo de senditaj gazetarkomunikaĵoj

## 12 Listo de gazetaj artikoloj pro gazetarkomunikaĵo

## 13 Listo de aliaj gazetaj artikoloj pri esperanto

## 14 Listo de aliaj gazetaj artikoloj pri reagindaj temoj

## 15 Bilancoj